

## Josip Broz Tito, la esperantista prezidento protektos la UK-n

La prezidento de Jugoslavio **Josip Broz Tito**, kiu ĉi-jare festis sian 80-jaran jubileon, akceptis fariĝi protektanto de la 58-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la ĉefurbo de Jugoslavio, Beogrado, venontan jaron.

Estas dua fojo en la historio de Esperanto, ke ŝtatestro, kiu lernis la internacian lingvon, alte protektas Universalan Kongreson; unuafoje, kiel konate, tio okazis en Vieno en la jaro 1970, kiam protektanto estis la aŭstra prezidento Franz Jonas.

Pri la sinteno de marŝalo Tito al Esperanto oni povas legi en la numeroj 1181 kaj 1182 de la gazto "Heroldo de Esperanto", aperintaj en julio / aŭgusto 1953, t.e. antaŭ proksimume 19 jaroj, en la tempo de la Universala Esperanto-kongreso en Zagrebo. En tiu okazo, la prezidento Tito ricevis dum unuhora aŭdienco, la 4-an de junio 1953, delegacion de esperantistoj, inter kiuj sinjoro Mason Stuttard, tiama kongresa sekretario.



Laŭ la raporto aperinta en "Heroldo", sinjoro Stuttard informis marŝalon Tito pri la preparlaboroj por la kongreso, kaj donacis al li kelkaj Esperantajn librojn; alia membro de la esperanto-delegacio interpretis, sed je la fino Tito kun larĝa rideto respondis **en Esperanto**: "Mi ĉion komprenis. Mi lernis Esperanton en malliberejo". Daŭrigante, Tito diris, ke li sufiĉe bone komprenas, se oni malrapide parolas. Li lernis la lingvon en mallonga tempo kaj trovis ĝin facila; li tamen neniam havis okazon konversacii. Li petis informon pri la eldono de lia biografio en Esperanto; poste li montris intereson pri la evoluo de la lingvo. Li komentis, ke Esperanto estas bela lingvo, kaj lernante ĝin oni trovas multajn similecojn al aliaj lingvoj.

Dum la menciita aŭdienco okazinta antaŭ 19 jaroj, oni ankaŭ tuŝis aliajn temojn. Ekzemple, oni demandis de marŝalo Tito, ĉu dum siaj vojaĝoj al eksterlando li spertis malfacilaĵojn pro la lingva problemo. Tito respondis: "Kiam mi iris eksterlanden, mi havis scion pri la germana kaj rusa; poste mi lernis kirgizan. Tial mi ne spertis apartajn malfacilaĵojn. Nur en Francio estis iom malfacile, ĉar la francoj pro la internacia situacio antaŭ la unua mondmilito, ne inklinitis paroli la germanan. Rilate al lingvolernado, tamen - aldonis marŝalo Tito - mi volas diri, ke Esperanto estas multe pli facile lernebla ol iu ajn alia lingvo. Mi opinias, ke la lernado de Esperanto estas nun tre aktuala. Scion de Esperanto oni povus utiligi en ĉiu lando. Precipe en la turismo ĝi estas grava.

En la sama aŭdienco de 1953, prezidento Tito esprimis opinion, ke Esperanton oni devus enkonduki en ĉiujn lernejojn, sed ne per dekreto de supre, male per la premo de informita publika opinio de malsupre, laŭ vere demokrata maniero.

Fine, akceptante donace kelkajn literaturajn librojn en Esperanto, la prezidento esprimis sian dankon, kaj aldonis en Esperanto: "*Mi legos ilin*".

La favora sinteno al la internacia lingvo de la jugoslavia ŝtatestro estas valora aŭspicio por la bonsukceso de la venontjara universala kongreso.